



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. (8 Euroj) Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

FERIA BULTENO

Multaj legantoj de Normanda Bulteno ferios kiam ili ricevos ĝin. Kutime, mi aperigas nian ligilon dum junio. Kiel redaktanto, mi devas klarigi la kaŭzojn de tiu malfruo.

-Persona motivo: Komence de majo, pro operacio ĉe okulo mi restis kelkajn tagojn en hospitalo kaj vidkapablo malgrandiĝis. Dum pli ol 2 monatoj, mi malfacile kaj lacige legis, skribis kaj ne povis tajpi !!!

- Alia motivo: mi ne estis ricevinta artikolojn kaj informojn. Mi vane atendis tekstojn. Mi memorigas al ĉiuj ke ĉefa celo de nia bulteno estas interligi normandajn esperantistojn. Do, sendu al mi artikolojn, ĉu franclingvajn, ĉu esperantajn. Rakontu pri viaj ferioj kaj travivaĵoj. Ni esperas ke multaj el vi profitos someron por partopreni esperantistajn aranĝojn: kongresoj, staĝoj. Raportu pri ili; skribu viajn impresojn.

Profitu feriojn por pripensi estonton de nia regiona asocio: ĉi-jare, ni ne povis organizi Ĝeneralan Kunvenon ĉar neniuj grupo aŭ izolita aktivulo sin proponis por ĝin organizi. Niaj grupoj pli aŭ malpli stagnas. Nur la grupo en Hérouville bone aktivis. Malaperis grupoj en Saint Lo kaj en Yvetot. Ne eblis starigi klubojn en Fécamp kaj Dieppe. En Le Havre, la grupo kunvenas ĉiumonate sed ne sukcesis interesi novajn kaj junajn homojn. En Grand Quevilly, okazis ĉiusemajnaj kunvenoj sed neniuj gvidas kurson por komencantoj; pro tio ne venas novuloj kaj ekde aŭtuno, la kunvenoj ne plu estos semajnaj sed monataj. De multaj jaroj, ne plu ekzistas grupo en Rouen.

Kio okazas en Normandio? Kial Esperanto interesas neniun? Normandio situas inter 2 regionoj tre aktivaj. Ni ricevas "Nordan Gazeton" kaj "Bultenon Esperanto Bretagne". En Nordfranca federacio kaj en Bretona federacio, la grupoj estas multaj kaj tre viglaj; ili eldonas bultenojn pli interesajn ol nian. La naciaj asocioj bone fartas: Kongreso de SAT-Amikaro en Chambéry kun pli ol 200 kongresanoj estis sukcesa (Nur 2 Normandoj ĝin partoprenis: Odile Masseron el Hérouville kaj mi). Kongreso de Esperanto France (U.F.E.) en Limoges estis tre pozitiva kaj fruktedona (nur unu Normando: Dominique Leroy el Rouen). SAT-Amikaro klopodas por akiri taŭgan lokalon ĉe granda bulvarde en 13a Pariza distrikto. Esperanto-France eldonas novan revuon: "Le Monde de l'Esperanto". Ĝi estas 20 paĝa, belaspekta kun profesia kvalito, efika kaj serioza propagandilo. Esperanto estas pli kaj pli uzata per Interreto. Pli kaj pli da gejunuloj interesiĝas pri Esperanto kaj aliĝas al JEFO. Oni do povas diri franclingve: "l'Espéranto ça marche !"

Sed oni aldonu: "Escepte en Normandio". En nia provinco, ne estas junaj aktivuloj por anstataŭigi lacajn kaj maljunajn gvidantojn. Novaj ideoj kaj granda entuziasmo estas nepre necesaj por starigi novan kaj efikan asocion.

Venontjare, mi ne plu prizorgos la bultenon. Kiu kandidatiĝos kiel redaktanto ? Mi jam faris alvokon por tio. Mi estas ankaŭ kasisto de U.N.E. kaj de la Federacio kaj SAT-peranto.

La tuta estraro de nia unuiĝo devus esti renovigita.

Bone profitu feriojn sed jam pripensu ke Esperanto bezonos viajn kontribuojn kaj sindonemon ?

Petro KIJŬ

NOTRE REGION

Grand Quevilly: Les réunions hebdomadaires deviendront mensuelles à partir de l'automne; elles auront lieu le 1er Jeudi du mois de 18h à 19h30 dans la salle N°2 du Centre Socio Culturel. Une convocation sera adressée par la poste aux adhérents de la section à l'occasion de la reprise. Des réunions exceptionnelles pourront avoir lieu à l'occasion de la visite d'espérantistes étrangers

ROUEN: Paule LOISON qui fut une très active espérantiste nous a quittés à 92 ans. Elle avait enseigné notre langue à Pierre Quillaud

GRANVILLE: Roger MICHAUD est décédé le 20 Mai 2001. Selon sa volonté, il a fait don de son corps à la science. Nous présentons nos plus sincères condoléances à son épouse Gisèle.

LE HAVRE: Havra klubo nepre ne volis manki okazon partopreni foiron de asocioj sabaton 30an de Junio kaj dimanĉon 1an de Julio. Tiu evento okazis en nova ekspozicia salonego "Dock Café"

Organizintoj proponis al reprezentantoj de asocioj havi budon. Tiuj varbejoj estis atribuitaj laŭ enskribiĝo kaj grupe starigitaj. Tiel, vizitantoj ne nur paŝis al hobia poluso sed ankaŭ konservis scivolemon al nova elstara Ŝildo.

Plejmulto de la klubanoj volonte deĵoris dum semajnfino kaj siafake argumentis por Internacia Lingvo. Esperanto ne estis nekonata koncepto por informpetantoj. Ĉiu kvara el ili jam spertis la "aferon" en familia rondo.

Ni renkontis diversgeneraciajn interesiĝantojn. Foliuminte verkaĵojn de libroprezento aŭ pere de varbpaneloj, la publiko volonte konsentis diskutadon. Loka radio intervjuis nin por prezento de Havra Esperantista Grupo.

Post somera paŭzo, ni antaŭvidas bonvenigi simpatiantojn kaj espereble decidi malfermon de kurso por komencantoj.

Sylvie CARON

LISIEUX

KONGRESO EN AGRABLA ETOSO

La Katolikaj Esperantistoj kongresis en Lisieux de la 4a ĝis la 7a de Majo 2001.

La kongresejo staris en Foyer Louis et Zélie Martin estrata de la "Misiistaj Laboristinoj". Tiuj ĉi venas el diversaj landoj kaj afable kaj varme akceptis la kongresanojn. Post ĉiuj tag-kaj vespermanĝoj ili kantis belajn kantojn en la lingvoj de siaj landoj kaj en la franca, kio agrabligis la restadon.

Pastro Girault el Poitiers prelegis pri Sankta Tereza kaj Esperanto emfazante la vivon de la sanktulino, tre priokupata pri la problemoj de la malproksimaj landoj.

En la urbo Lisieux, agrabla promenado kondukis la partoprenantojn al la belega gotika katedralo, al la bele aranĝita urboparko kaj al la lokoj kie vivis Sankta Tereza: Les Buissonnets, ŝia gepatra domo, la Karmelo kie ŝi vivis kiel monaĥino.

La lastan tagon, la kongresanoj ekskursis al la kastelo St Germain de Livet, belega renesanca konstruaĵo, meze de agabla parko, kie pavoj montris la belaĵojn de siaj vostoj.

Ili ankaŭ iris laŭlonge de marbordo al Honfleur kie ili admiris la antikvajn stratetojn kaj, ĉefe la mirindan preĝejon Sankta Katarina; ĝi estas konstruita tute el ligno en la 15ajarcento de maristaj ĉarpentistoj.

Albert BESSIERE

RUSOJ VIZITIS NORMANDION

VALERIJA CVETKOVA: Tiuj kiuj havis la plezuron vojaĝi al Leningrad (aŭ St Peterburg) vizitis tiun belegan urbon gvidataj de Barbara kaj ŝia filino Valerja. En 1990, Barbara, 80-jara, estis invitata en Francion. Kelkaj Normandoj akceptis ŝin. Barbara mortis kaj ĉi-jare, ŝia filino venis en nian landon. Ŝi vizitis Parizon, partoprenis landan kongreson en Chambéry. Post Provenco, Bordoza regiono kaj Lŭara valo, ŝi restadis kelkajn tagojn en H rouville kaj en R ena regiono. Tiun belan vojaĝon estis realigebla dank'al esperantista solidareco. Barbara kaj Valerja dedi is sian vivon al Esperanto : ili meritis tian rekompenco.

SASA BELOV / 3:54:31/569a

Nia klubo, jam de dek jaroj tre regule rilatas kun la klubo de Tikvino, nia ĝemela urbo en Rusio, en la regiono de Sankta Peterburgo. Plurfoje ni iris, plurfoje ili venis. La urbaj instancoj de H rouville regule konfirmas al ni, ke nia klubo estas la sola kiu havas konstantajn rilatojn kun tikvinanoj.  u artefarita nia esperanta lingvo ?

Tieaj esperantistoj jam venis per trajno, aŭ aŭtomobilo, aviadilo. Neniu inter ili provis vojaĝi per biciklo aŭ  evalo (kial ne ?), sed Sa a BELOV venis per siaj piedoj ! Tamen ni ne troigu : li venis aviadile kun la intenco kuri laŭ la francaj vojoj. Sa a, kvardekkvin jara, vivas por du hobiaj, nome esperanto kaj maratonoj. Pro tio ni invitis lin partopreni la maratonon por libereco, "Marathon de la Libert ", en Caen. Li tuj fervore sin preparis.

Akceptis lin en la flughaveno Roissy Mich le ABADA-SIMON,  e kiu li tranoktis, en Asni res. Ili kune iris al la kongreso de Limoges kie familio CLOPEAU pruntedonis al li dormsakon por tranoktado en la "amaslo ejo". Dominique LEROY veturigis lin al Rouen. Li tranoktis  e Petro KIJO kiu estis lia    erono dum la vizito de Rouen. En H rouville, pluraj samideanoj intervenis por ke li vizitu nian marbordon, Honfleur, ktp (Claude, Patrick, Th r se, V ronique, Jean, Yves) .

Li kaptis la okazon por partopreni kunvenon de nia loka asocio prizorganta la ĝemelajn aferojn kun Tikvino. Li ankaŭ renkontis la novan urbokonsilanton pri la internaciaj rilatoj (tiu vizitos Tikvinon post kelkaj semajnoj). La kontakto estis facila  ar Sa a tre bone scipovas la francan.

Por sin prepari li ankaŭ trejni is kun la maratonanoj de nia loka atletisma klubo kiu donacis al li T- emizon kun la nomo de la klubo. La dekan de junio li partoprenis la maratonon, kiel 1070 aliaj sportistoj . Li estis la 569a atinginta la 42an kilometron, post 3 horoj, 54 minutoj, 51 sekundoj. Mirinde ne laca : imagu ke, du tagojn poste li kuris  is la maro (13 km) sin banis kaj kure revenis !

Ni konkludis la aferon per kluba vesperman o en normanda restoracio (Fran oise, Patrick, Claude, Yves Bachimont, Yves Nicolas, Henri, Jean, Odile, Marie-Micheline). Ouest-France raportis pri lia restado en favora artikolo.

Fini is tiu dusemajna restado la 14an de junio. Sa a, al kiu lando vi venontfoje forflugos por partopreni maratonon, kaj tiel reklami por nia internacia lingvo ?

Yves Nicolas.



Du anekdotoj rilatantaj kun la esperantista vivo en Maroko en 1956

En Rabat, mi kreis en 1956 en la "Oceankvartalo", publikan kurson de esperanto kaj apartan asocion. Tiu kvartalo, en kiu mi loĝis, estis precipe loĝata de "nigropieduloj" (1) de hispana deveno. Mia kurso estis frekventita de dudeko da junaj viroj, kies plejparto estis kontraŭfrankistaj politikaj rifuĝintoj. Tio min konvenis. Unu aŭ du lernantoj jam havis bonajn nociojn pri la internacia lingvo, el kiuj unu, nomita Acedo. Sed rapide mi komprenis ke esperanto estis por ili nur preteksto, kovrilo, kaj ke mi estis nur kaŝilo. Realece, kiel fremdaj politikaj rifuĝintoj, ili havis nek kunvenrajton, nek asocirajton en la Maroko ĵus fariĝinta sendependa, dezirema disvolviĝi bonajn rilatojn kun la najbara Hispanio. La esperantista asocio estis ne pli ol rimedo ĉirkaŭpaliati la leĝon. Miaj novaj "samideanoj" estis ultrasektemaj anarkistoj, farintaj la civilan militon, de ĝi multege suferintaj, kaj preskaŭ ĉiuj mortokondamnitaj hejmolande.

Ili estis tiom terure antikomunistaj kiom antifranksistaj, kaj iutage mi havis kun unu el ili gravan incidenton ĉar mi estis pekinta kontraŭ la neŭtraleco de esperanto, uzante por nia laboro tekston nete maldekstren orientigitan, kaj naive estis ĝin defendinta. Nur dank'al liaj pli saĝaj kunuloj, la afero restis parola. Tio finapertis miajn okulojn kaj mi cedis la lokon; la asocio daŭris sen mi kaj verŝajne sen multe da esperanto.

Sed feliĉe mia esperantista aktiveco en Rabat ne limiĝis al la asocio de la Oceankvartalo, ĉar ekzistis en la urbo pli ordinara esperanto-asocio; ĝi estis gvidata de iu S-ro René CAGNON, fervora progresema katoliko, tiam eble 45-jaraĝa (2). Mi ĉeestis la kunvenojn kie venis precipe francoj, eble deko da judaj marokanoj kaj du aŭ tri muzulmanoj. Ofte okazis interurbaj piknikoj, kaj la etoso ĉiam estis juna kaj simpatega.

La 27-an de januaro 1957, malfermiĝis en Fez la "Konferenco de la arabaj ŝtatoj de UNESKO". S-ro Charles THOLLEY (3) el Port-Lyautey (nun: Kenitra), prezidanto de la maroka asocio, decidis tien iri kaj min petis lin akompani. Li havigis al ni gazetistokartojn, kaj paradvestite ni iris ĝis Fez en lia luksa veturilo. La Konferenco okazis en la palaco Batha kaj en la gimnazio Moulay Idriss. Ni disdonis centojn da faldfolioj pri esperanto en sep lingvoj, inter kiuj la araba (4). Ni metis ilin sur ĉiuj seĝoj kaj tabloj, plurfoje. S-ro Tholley lasis komunikaĵojn ĉe la gazetarsevo, kaj eĉ provis ekparoli ĉe la tribuno dum kunsido: sed la kunsidprezidanto, kiu lin bone konis, afable malpermesis lin tion fari, kun motivo ke la neŝtataj organizaĵoj ne havis parolrajton dum tiu konferenco.

Inter du kunsidoj, dum kiam ni disdonis dokumentojn en la halo, ni estis enŝovigitaj en nekontraŭstareblan moviĝon de popolamaso, kaj disigitaj. Estis tion kaŭzinta la alveno de la reĝo de Maroko, Mohamed V, veninte por saluti la diversnaciajn delegitojn. Estis por ni neeble eskapi. Mi retroviĝis do meze de moŝtuloj, starante apud Allal el Fassi, la estro de la registara partio "Istiqlal" kaj ministro de io; li manpremis kun mi kiel kun malnova konatulo, sin verŝajne petante kiu mi ja povis esti. Dum la bonvensalutoj mi estis kvin metroj malantaŭ la reĝo, min farante kiel eble plej malgranda pro timo ke Li ankaŭ manpremu kun mi: tiakaze mi estus devinta prezentiĝi, kiel ? ! kaj tio estus min rimarkiginta de M'Hamed Douiri, inĝeniero pri Pontoj kaj ŝoseoj, Ministro pri Virkado (publikaj laboroj), mia supera estro, kiu min bone konis, de kiu mi min kaŝis, ĉar li estus tute prave sin petinta (kaj eble ankaŭ al mi), kion mi ja faris tie !

Henri ROUSSEAU

(1) Francingve: "pieds noirs", tio estas eŭropanoj naskiĝintaj en nordafriko,

(2) S-ro Cagnon, delegito de UEA, estis aŭtoro de "Gramatiko de Esperanto", tute en esperanto, surstencile maŝintajpita, kaj multoblighita, de kiu mi posedas unu ekzempleron.

(3) S-ro Tholley estis fervorega esperantisto, delegito de UEA, eble tiam 60-jara; li havis en nia juna rondo la reputacion de riĉega homo; fakte, li estis proprietulo, krom de bela vilao, de gravega ladajejo; li ĉiam pretis malavare pagi propramone por helpi ĉiun iniciativon por la antaŭeniro de esperanto. Dank'al li, kiam mi unuafoje alvenis en Maroko (Bonŝance en Port-Lyautey) por mia militservo, mi tuj tie havis lokajn amikojn, afero tute escepta por la metropolanaj junaj soldatoj.

(4) Mi ankoraŭ posedas unu specimenon de tiu faldfolio eldonita de UEA; ĝia aldonita araba faldajo eble estis verkita, presita kaj algluita diligente kaj koste de S-ro Tholley (?).

57e Congrès Mondial d'Espéranto pour les jeunes à Strasbourg.


Comme chaque année, les jeunes espérantophones du monde entier se retrouvent pour une semaine d'amusements et de détente dans une ambiance vraiment internationale, autour de concerts, de spectacles, de conférences à thèmes...avec pour seule langue l'Espéranto.

Mais cette année, l'IJK (Internacia Junulara Kongreso) revêt une particularité, puisqu'il se déroulera à Strasbourg, siège du Conseil de l'Europe et ville-symbole dans le cadre de l'année européenne des langues ; d'ailleurs, le thème du Congrès est « Plurilinguisme en Europe, comment le réussir ? ». La rencontre se déroulera du 29 Juillet au 5 Août 2001.

A ce propos, le Congrès de cette année aura, en plus du programme habituel, l'exclusivité d'un festival de deux jours, qui se déroulera dans les rues piétonnes et sur la place Kléber de Strasbourg, donnant aux passants l'occasion de découvrir directement l'Espéranto, mais aussi les autres langues !

C'est en effet un festival des arts et des langues dans lequel de nombreux artistes espérantophones exprimeront leurs talents soit dans leur langue natale, soit en Espéranto. On pourra alors assister à des concerts, des pièces de théâtre, mais encore à des chants, danses, déclamations de poèmes, ou bien l'on pourra découvrir des œuvres intéressantes dans le domaine de la peinture, du land-art. Et puis, en plus de ces artistes, amateurs ou professionnels, le festival permettra aussi de présenter quelques langues sous forme de mini-cours, ouverts à tous.

Ainsi, ce 57e Congrès, tout en rassemblant des centaines de jeunes de différents pays, donne aussi l'occasion à l'Espéranto de se faire connaître aux populations, sur un même pied d'égalité avec d'autres langues, le tout dans une atmosphère vraiment internationale et récréative !



ESPERANTO TEKSTO

Kiel plej parte de la homoj verŝajne jam scias, tiu-ĉi 57a IJK okazos en Francio, plej precize en Strasburgo. Sed eble ĉiuj ankoraŭ ne informiĝis, ke tiu-ĉi kongreso havos apartan originalecon : ĝi enhavas, en sia programo, festivalon de artoj kaj lingvoj, kiu daŭros du tagojn kaj okazos en la stratoj de la urbo Strasbourg.

En tiu-ĉi festivalo oni povos malkovri diversajn formojn de artoj, kiel ekzemple teatraĵoj, desegnaĵoj, koncertoj, dancoj, kantoj.ktp. Estos tre malferma E- festivalo, kaj ne nur esperantistoj povos ĝui ĝin ! Oni povas facile vidi la ĉefan celon : ĝi montras al la ne-esperantistoj la vivon de la lingvo Esperanto, kaj ĝian egalecon kun la aliaj lingvoj, ĉar dum la festivalo oni ankaŭ prezentos artaĵojn en sia nacia lingvo ! Aldone, la festivalo evidente permesas pli grandan ĝuadon de la kongreso por la esperantistoj, ĉar oni tiel malkovras la talentojn de artistoj, kiuj venas de diversaj landoj .

Sed tiu-ĉi festivalo ne nur konsistos en vivaj artistaĵoj, ĝi ankaŭ enkondukos homojn al la prezentado de lingvoj, pere de malgrandaj lekcioj.

Oni vere povas vidi, ke tiu festivalo permesas esperantan kongreson ne nur en ferma loko, sed kondukas ankaŭ la homojn al la ekstero, t.e. ke esperanto vere montras sin kiel internacia lingvo, pere de tiu festivalo kiu mem estas internacia.

Do, se vi volas ĝui la agrablan etoson de tiu 57a IJK, kun festivalo kiu vekos la urbon Strasburgo mem, se vi volas aŭdi aŭ rigardi artistaĵojn el Danio, Pollando, Francio, Aŭstralio, Kanado.liberigu vin inter la 29a de Julio kaj la 5a de Aŭgusto !

La 12-an de julio tagmeze, la televizia ĉeno "Canal +" dissendis eltiraĵojn de intervjuo en kiu Valéry Giscard d'Estaing parolis i.a. pri sia kono de la ĉina lingvo, kiun li eklernis antaŭ sufiĉe multe da jaroj, eble pli ol dek se mi bone memoras. Cetere, en la sama periodo, François Mitterrand esprimis intencon perfektigi sian konon de la germana. La eks-prezidento diris sin ne tre kontenta pri sia kono de la ĉina kaj multe cerbumis por doni nur ege banalajn respondojn.

"Se la lernado de fremdaj lingvoj estas ĝisfunde puŝita tiel ke ĝi profitas al la spirito, ĝi postulas multege da tempo. Se ĝi estas supraĵa, ĝi alportas preskau nenion al la intelekta kulturo".



Tion skribis jam en 1918 la eminenta lingvisto Antoine Meillet (1866-1936), membro de la franca Instituto, profesoro en Kolegio de Francio, en „Les langues dans l'Europe nouvelle”, verko en kiu li cetere demonstris ke la termino "artefarita", kiu estis al ĝi foje aplikata, havas nenian seriozan bazon. Paris : Eld. Payot. Dua eldono en 1928, p. 278.

Ebla proponenda interŝanĝo : homaj rajtoj en Chinio kontraŭ rajto je lingva egaleco por libera komunikado tutmonde ? Spit ! Por iuj, pli ol miliardo da loĝantoj, tio estas merkato en kiu ne multe pezas la rajtoj. Por ni, tio estas homaj estaĵoj.



Le 12 juillet à midi, la chaîne de télévision "Canal +" a diffusé des extraits d'un entretien dans lequel Valéry Giscard d'Estaing parlait entre autres de sa connaissance de la langue chinoise qu'il avait commencé à apprendre voici pas mal d'années, plus de dix si je me souviens bien. Par ailleurs, durant la même période, François Mitterrand avait exprimé l'intention de perfectionner sa connaissance de l'allemand. L'ex-président s'est dit pas très content de sa connaissance du chinois et a longtemps peiné pour ne donner que des réponses tout à fait banales.

"Si l'apprentissage des langues étrangères est poussé à fond de manière à profiter à l'esprit, il demande un temps immense. S'il est superficiel, il n'apporte presque rien à la culture intellectuelle."

C'est ce qu'a écrit dès 1918 l'éminent linguiste Antoine Meillet (1866-1936), membre de l'Institut, professeur au Collège de France, dans „Les langues dans l'Europe nouvelle”, ouvrage dans lequel il avait par ailleurs exprimé un avis favorable à l'espéranto et démontré que le terme "artificiel" qui lui était parfois appliqué n'avait aucune base sérieuse. Paris : Payot, 1918. Seconde édition en 1928, p. 278.



Echange possible à proposer : Droits de l'Homme en Chine contre droits à l'égalité linguistique pour la libre communication dans le monde entier ? Chiche ! Pour certains, plus d'un milliard d'habitants, c'est un marché dans lequel les droits ne pèsent pas lourd. Pour nous, ce sont des êtres humains.

Henri MASSON

(Secrétaire Général de SAT-Amikaro)